

Sp004

La Sperto

Typ Drukkerij Soelawesi Makassar

Sendependa monata organo

Redaktoroj: Pengarang2
 A. R. Mewengkang
 Mamesah.
 Adreso: Tronkweg
 Makassar — Selebés D. E. I.

Tarifo de „La Sperto“
 5 sv. fr. f 2.50 unu jaro antaupage.
 Harga langganan f 2.50 setaħoen.
 bajaran lebih doħloe.
 1 nomor f 0.25

Administracio — Bendahari
 H. H. Mewengkang
 Adreso: Tronkweg
 Makassar.
 Selebés — Indonesia D. E. I.

Chiujn esperantomaterialojn k. Korespondadojn adreħu al s. ro P. Mamesah Lariangbangi Makassar Ned-Hindujo

SELEBES - INSULO.

Antauparolo

„Je chiu apero de tiu chi organo, ni faras chefartikolon pri la situacio en Indonesujo, t. e. pri la kulturo, ceremonio, k. t. p. Koncerne la eldoncion de tiu chi organo, nome, en Makasaro, Selebés-insulo, ni do komencas kun nia celo pri historio de Selebésujo-situacio.

Che la unua apero, ni certe ne povas la tutan historion enmeti pro ĝhia amplekso, do nepe estos daurigata.“

La Redakcio.



A. R. Mewengkang.

Je la komenco, ni klarigas, ke la insulo Selebés estas la plej malgranda insulo el kvin Indonesaj (Nederl. Hindaj) insulegoj.

Ĝhia loĝantaro estas 4226.586, kiu konsistas el 4168.186 indigenoj, 7921 europanoj, 41.319 ĉinoj, 9160 fremdaj orientanoj. La skalo estas 189.535.89 K. M2 (kvadrataj kilometroj); se oni nombras la loĝantaron de ĉiu kvadrata kilometro, estas do 22.3 anoj.

Lau la registaro, la insulo estas dividita je du provincoj, nome: la norda Selebésujo, regata de rezidento en Manado, Minahasa-lan-

do, kaj la suda Selebésujo, regata de guberniestro en Makasaro.

Escepte la fremdaj lingvoj, la indigenaj lingvoj konsistas el 20 gravaj lingvoj, ĉies dialekto estas en ĉiu urbo preskaŭ malsama; se oni kalkulas ĝin, estas plus minus 200 specoj da dialektoj. Pro tio, la ceremonioj, moroj au kutimoj ankaŭ diferencas. [Pri tio, ni pli poste klarigos M.]

Kvankam tiu ĉi lando ne estas tre vasta kaj ĝhia loĝantaro ne tiel multa, tamen la interrilato estas tre malagrable, pro tio, la ĉefa instruado en tiu ĉi lando estas malajala lingvo [Indonesia], kiu farigas ĝeneralala lingvo de Indonesio; de tiu ĉi lingvo neniu vorto estas sama kun lingvo de loĝantaro de la insulo Selebés.

El la ĉifitaj lingvoj, estas grava lingvo, nomita „Bugis“; ĉi tiuj Bugisanoj estas kuragħaj kaj kleraj; ili tre ŝatas komerci eksteren [en aliajn lokojn au landojn], ke, preskaŭ en ĉiu loko che la marbordo de Selebésujo, ankaŭ en kelkaj lokoj en Indonesujo loĝas Bugisanoj.

Pli kaj pli kooatighis la Bugislingvo, ĉar ĝi ankaŭ havas specialajn literojn, kiujn ankaŭ uzas la Makassar-, Salajar-, Butung-, Kajeli-, kaj Mandar-lingvoj.

[Ĉi tiuj literoj ni eble povos prezenti al nia legantaro.]

[Daurigota.]

THE NAZI OFFICIALS ARE ALL FOR CULTURE.

The leader of the National Socialist Staff of Bemberg region has ordered all officials with a salary of over 311 marks to subscribe to seats in the Town Theatre. Only officials with more than three children are exempt. Köln and Dusseldorf have set the example in passing this measure. The choice is set between going to the theatre and having a big family. The quality of the fascist reformed theatre should give a fillip to the birth-rate.

(„Contact“ - L.E.A.)

ALVOKO

Estimata legantaro!

Ĉi tiu unuan numeron de „La Sperto“ ni atingigas vin kun la espero, ke vi ĝin bonvolu ricevi kun malfermitaj manoj. Ĉar nia celo pri tio, ke ĉi tiu organo povu esti legata de la tutmonda homaro, kaj ĝhia fundamento estas do certe ankaŭ „mondlingvo“, t. e. „Esperanto“.

Sed pensante, ke ankoraŭ multaj el niaj naciaj (Indonesianoj), kiuj ne scias kaj ne lernas Esperanton, ni do ankaŭ aldonas malajale traduktajn artikolojn (novajhojn), ĝenerale sciindajn au legindajn, ĉefe novajn el eksterlandoj. Tiamaniere, ni deziras, ke tiu ĉi organo estu leginda por ĉiu.

Pli ne ankaŭ necese sciigas koncerne la eldoniston al kiu mankas financojn, ke je la dua numero devos esti plenpaginta la preskoston, pro tio, ni do tute ne petas de vi, kiu bonvole ricevis tiun ĉi organon tuj sendi au pagi la abonkotizon, ĉar je la dua apero kiam ni ankoraŭ ne ricevis kotizon, tiam ni ĉesigas la alsendon de l'organo.

SEROEAN

Pembatja jang terhormat!

Nomor pertama dari soerat kabar ini, kita sampaikan dengan pengharapan nanti diterima dengan tangan terboeka.

Karena maksoed kita soepaja soerat kabar ini dibatja oleh segala bangsa didoenia, maka dasar bahasa dalamna tentoe „bahasa Doenia“ poela, ialah bahasa „Esperanto“.

Tapi mengingat bangsa kita masih banjak sekali jang beloem mempelajari bahasa Esperanto, maka kita moeatkan poela dalam bahasa Melajoe, jang mana tentoe kita pilih sadja jang perloe diketahoel oemoem, teroe tama pri keadaen dari loear negeri. Dengan begini, kita maoc ini s. k. akan bisa djoega membawa pengalaman2 oemoem.

Lain dari pada itoe, perloe kita wartakan bahwa berhoebong dengan penerbit boekan mampoe, maka tjetakannya moela nomor 2, akan kita tjoekoepkan sadja menoeroet banjaknja jang membajar, djadi kita minta soepaja siapa2 jang menerima soerat kabar ini, dalam waktoe terimanja segera kirimkan har ganja, karena kalau sampai penerbitan nomor 2 kita tidak terima, paagiriman akan kita tidak teroeskan.

Sp004

Redaktoroj:
A. R. Mewengkang
P. Mamesah
Adreso: Tronkweg
Makassar—Selebes D. E. I.
Chiuĵn esperantomateria-
lojn k. Korrespondadojn
adresu al s. ro P. Mamesah
Lariangbangi Makassar
Ned. Hindujo

LA SPERTO

Administracio
H. H. Mewengkang
Adreso: Tronkweg
Makassar.
Selebes — Indonesia
D. E. I.
Tarifo de „La Sperto“
5 sv. fr. f 2.50 unu
Jaro antaŭpage

DRUKKERIJ SOELAWESI MAKASSAR

Sendependa monata organo

ISINJA DILOEAR TANGGOERANG PENTJETAK

Korespondadresoĵi ĉiuŭ vorto f 0.03. Reklamtarifo: 1 pago: 20 gld. 1/2 pago: 11 gld. 1/4 pago: 6 gld. 1/8 pago: 3.5 gld. 1/16 pago: 2 gld.

Chiuĵn rajtoj rezervitaĵ

SELEBES-INSULO.

[Daŭrige]

Ni jam klarigis en la unua numero de tiu ĉi organo, ke la loĝhantaro de Selebes—insulo havas diversajn lingvojn malsamajn. Tiel same ankaŭ iliaj religioj estas diversaj. El la gentoj de Bugis, Makassar, Mandar, Salajar, Buton kaj Gorontalo plej multe kredas la mahometreligion [ili do estas mahometanoj]. El la gentoj de Toradja, kiuj loĝhas meze de la Selebes—insulo plej multe estas kristanoj. La gentoj de Toradja, kiuj kredas la mahometreligion estas tiuj, kiuj loĝhas apud la urboj de mahometanoj. Ĝhis nun restas ankoraŭ tre malmulte da idolser-
vantoj.

De ĉiuĵn anoj de Minahasa lando (300.000 loĝhantaro) (norda parto de l' Selebes-insulo) estas ĉirkaŭ 90 procentoj, kiuj estas kristanoj kaj la aliaj estas mahometanoj; tiuj ĉi mahometanoj estas nur la enmigrintoj, precipe el la loĝhantaro de l'bordlarboj en Minahasa lando plej multe estas mahometanoj.

Se oni ekskursas tra l'tuta lando Minahasa oni cerĵiam preterpasas urbojn aŭ vilaĝojn, en kiuj la domoj estas bonorde konstruitaj. En ĉiu urbo aŭ vilaĝo oni povas vidi plej malmulte unu preĝejojn de l'kristanoj; pro tio, povas esti dirita, ke la gentoj de Minahasa estas la plej civilizitaj gentoj en la tuta indonesia insularo. Nun multe da gentoj de Minahasa disvastiĝhas tra la tuta Indoneŝujo. Parte estas sendita kiel oficistoj de l'registararo, nome, kiel instruistoj doganistoj, militistoj kaj aliaj registaraj funk-
ciantoj.

Precipe la nuntempaj junuloj, kiuj sufiĉe sin sentas lertaj aŭ kleraj, senhezite ili tuj forlasis sian patrujon por iri al aliaj landoj.

La lando Minahasa estas ankoraŭ tre vasta por la terkulturado de la loĝhantaro, pro tio, kvankam ĉiuĵn gentoj de Minahasa, kiuj forvojaĝhas al aliaj landoj, revenas en sian patrujon, tamen ili ne timas la malsaton, se nur, ke ili diligente aŭ perforte terkulturas. Pro la legado de tiu ĉi rakonto, kompreneble la legantoj demandas sin: „Se tio estas vera, ke la lando Minahasa estas ankoraŭ vasta por la terkulturado, kial multe de Minahasa gentoj forvojaĝhas al aliaj landoj?“ La respondo estas: „La gentoj de Minahasa kiuj forvojaĝhas al aliaj landoj, ne estas dirite, ke ili timas malsaton, se ili daŭre restas en sia patrujo, sed la kialo, ke ili emas al kono aŭ scienco, ĉar ili estas certaj je sia kono, ke ili povas perfektigi sin, kiam ili spertas kaj konvinkighas pri tio.“ Tiel do estas la gentoj de Minahasa migrantaj, laborantaj aŭ loĝhantaj en aliaj landoj, ne nur ke ili ĉefe meritas monon, (jes, kompreneble por iliaj vivvimeĵoj en fremdaj landoj), estu lertaj kaj inteligentaj sed ankaŭ por scii la situacion en aliaj landoj. Tute aliaj ili estas ol la

Bugisgentoj, kiuj forvojaĝhas al aliaj landoj speciale por la komercado.

La gentoj de Selebes-insulo ne ĉiuĵn ŝatas forvojaĝhi al aliaj landoj, sed la aliaj ankaŭ terkulturas. Kokoskulturo estas la plej ŝatata kulturo de la gentoj en la tuta Selebesujo. Estas dirite, ke tra la tutaj bordoj de l'Selebes-insulo neniuĵn aliajn gravajn ol kokosarbojn oni vidas.

La kopro, kiu devenas de l'insuleto Tahise (t.e. dependa al Minahasa) estas la plej bona kopro en Indoneŝujo. Muskado kaj kariofilo, kiuj estas la ĉefaj komercaĵoj de post la tempoj antaŭ la orient-hinduĵa kompanio en la lando Minahasa kaj ĝhiaj dependaj insuletoj ĝhis nun ankoraŭ multaj trovighas. Kotonaro kano kaj kato ankaŭ trovighas en Selebesujo.

La lokoj, kie oni multe vendas ĉion ĉi estas Makassar, en la suda parto de Selebesujo kaj en la norda parto estas Manado. Ĉiuĵn produktajbojn eksportitajn de Selebesujo oni kolektas en ĉi tiuj du lokoj, de kie poste estas transportataj per ŝipoj al aliaj landoj aŭ ŝtatoj. Alia ol la du ĉitaj lokoj Gorontalo estas ankaŭ havenurbo (en la orienta bordo de l'norda Selebesujo) kiu espereble fariĝhas grava urbo pro la grava komerco.

Plue estas ankoraŭ aliaj produktajboj en Selebesujo, nome: cinamo, ĉokolado, rizo, nigra ligno [ligno, kiu estas nigra kaj tre malmola kiel fero] kaj ankaŭ en kelkaj lokoj trovighas oro aŭ minejo de oro, arĝento, nikelo kaj asfalto sur la Buton-insuleto.

Petroleo ankaŭ nun estas espuatata en la mezo de Selebesujo.

(Fino.)

KOKOSO KOPRO.

[M]

El la specoj de l'koloniaj produktajboj en Indoneŝujo, la kopro, t.e. la sekigitaj amandoj de l'kokosnuksoj, el kiuj oni elpremas oleon, estas la plej multe eksportita al la tuta mondo. La kopron oni povas utiligi por diversaj bezonaĵoj. Pro tio la kulturo de kokosarboj kaj la komerco de kopro estas tre gravaj en Indoneŝujo; pro tiuj ĉi aferoj jam multe da indonesianoj riĉiĝhis.

Se oni atentas en tuta Indoneŝujo, escepte sur montoj, oni vidas kokosarbojn. Multe aŭ malmulte, oni tuj povas provi la gravecon de ĉi kulturo por pli gravigi la progreson de l'ekonomio Indoneŝia, eksciinte la profiton de l'kopro.

Cetero, t.e. en Indoneŝujo estas pli vastaj la grundoj por la kokosplantado ol en la aliaj ŝtatoj, kiuj ankaŭ kokoskulturas. Ze ĉi indonesiaj produktajboj estas tre profitaj; rilate kun la kokoskulturo kaj la komerco de kopro, estas grava por la indoneŝia ekonomio, pri tio estas neshancelebla.

Pro la graveco de ĉi kulturo, la indoneŝianoj jam uzis ĉiuĵn fortojn plantadi kokosojn, daŭre dek ĉi cent jarojn kaj jam estas

multe da homoj kiuj havis stajn vivvimeĵojn pro ĉi kulturo, antaŭe tiel same kiel nun, kvankam nun ne plu estas tiel bona kiel en la antaŭaj tempoj.

Ŝajnas, ke Indoneŝujo produktas plejmultajn kokosojn, por scii pri tio, ni notu la jenajn ŝtatojn kiuj ankaŭ eksportas kokosojn kaj kopron.

Indoneŝujo	600.000	hentakroj
(Brita) Hindujo	560.000	..
Filipinuĵo	544.500	..
Cejlono	440.000	..
Malako	240.000	..
Insularo en la Pacifika oceano	227.500	..
Zanzibaro	20.000	..
Ceteraj ŝtatoj	239.500	..
	2.871.500	

(Ĉi supraĵ ciferoj estas la larghecoj de l'grundoj por la kokoskulturo en la tuta mondo en la jaro 1930 a. kiuj produktis por la mondbezonajhoj ĉirkaŭ 3.000.000 tunojn da kopro.)

De l' larghecnotoĵoj de kokoskulturado en Indoneŝujo oni rimarkas kaj facile komprenas, ke en Indoneŝujo estas sekundaj grundoj por la kreskantaj kokosarboj, se nur sur malalte kushantaj sablaj grundoj, por tiuj ĉi kulturo klera homo ne estas necesa, ĉar la lertaj terkulturistoj povas labori tion kaj, kvankam, ĝuste kun konduko de moderna scio, tamen, ili povas tion progresigi. Pro tio ke la kokosoj facile kreskadus, la kokoskulturo jam donis vivvimeĵojn al milonoj da homoj, ne nur al la kokoskulturistoj sed ankaŭ al la eksportistoj de „kopro“, kiu en la riĉaj tempoj jam donis gravajn profitojn al ili.

Por scii pri tio, oni povas atenti al la notajhoj de l'eksportoj en Javujo kaj ceteraj landoj.

En la jaro 1932 a Javo eksportis 62.714 tunojn kaj dude la ceteraj landoj eksportis 417.236 tunojn, do en tute, plus minus 480.000 tunojn. Kvankam la ciferoj de l'eksporto de Javo ĉiuĵane ŝanĝiĝhas, — kiuj montras neregulan kulturadon de Javo kompare kun la ceteraj landoj, kiuj ŝajnis, ke oni regule kulturas kokosojn — tamen, montriĝhas la profito de l' tiu ĉi kulturo por la kokoskulturantaj enloĝhantoj, precipe en la ceteraj landoj, kiuj la eksporto de post la jaro 1926 estas plus minus 400.000 tunoj.

En la jaro 1933 a la ceteraj landoj eksportis 471.730 tunojn kaj tiam Javo nur eksportis 14.483 tunojn, sed la tuta eksporto restis 486.218 tunoj.

Ĉi tiuj ciferoj nur koncernas la komercadon de kopro; la eksporto de hungkl (Java) t.e. restajhoj aŭ ekskremento de premita kopro) kiu ankaŭ estas grava, ankoraŭ ne estas kalkulita.